

THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated



"International Language"

52nd Year, No. 619

PRICE - ONE SHILLING
or Ten Shillings per year, post free

December 1956



Photo : J. C. D. Smith

La Kristnaska Arbo, Bristol
Ĉiujare Bristol ricevas donace el Danlando
grandegan Kristnaskan Arbon kiel geston de bonvolo

The British Esperantist

Publishers :

THE BRITISH ESPERANTO
ASSOCIATION, INC.
140, Holland Park Ave.,
London, W.11

Editor :

CECIL C. GOLDSMITH,
100, Long Lane,
Rickmansworth, Herts.

Contributions should be type-written, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements : £3 per page and pro rata to one-eighth.

IN THIS ISSUE

	page
Better Prospects : C.C.G. . .	161
Universala Kongreso, Marseille . .	162
U.N.E.S.K.O.	163
Messages from the Editor . .	163
Local News	164
"La Unuaj"	165
Prudenta Propagando : W.A.G. . .	166
New Books	167
Translation Competition . .	168
Kristnasko en Marseille	169
Esperanto en Radio : J. Brownlee . .	170
Students' Page : W. A. Gething . .	171
Official Notices	172
Mortoj	172
Volume Index	Centre pages

LA JUNAJ DETEKTIVOJ

de J. H. Sullivan

Tre interesa legolibro por la juna Esperantisto, kiel indikas ĉiuj recenzoj.

"... rapidmova rakonto, plena je ekscitaj okazaĵoj. La stilo, kvankam sufiĉe simpla, fluas modele kaj abundas per vigla dialogo."

The British Esperantist.

"Ĉi tiu libreto estas verkita precipe por geknaboj kaj, traleginte ĝin, mi kredas, ke ĝi bone taŭgas por tiu celo... Lingvo simpla kaj korekta. Entute, do, libreto rekomendinda."

Heroldo de Esperanto.

"... facile legebla, laŭ tuta amplekso de sia interesa enhavo."

Boletín de Hispana Esperantista Federacio.

44 paĝoj, ilustrita. Prezo 2/-, afranko 2p.

Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe The British Esperanto Association

The British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

52ND YEAR, No. 619

DECEMBER, 1956

BETTER PROSPECTS

FOR some time readers have been waiting to see the result of the recent advertising in *Everybody's*, *John Bull*, and *Illustrated*. Preliminary figures were given at the Council meeting on 6th October, and evoked some criticism. As a result, a sub-committee, consisting of N. R. Smith (Manchester), D. Broughton (Leicester), and C. C. Goldsmith, was appointed to go into the whole question of advertising and publicity.

This committee held its first meeting on 3rd November when the following figures were produced. Cost £362. Replies 498. Course enrolments 139. In addition, several enquirers had joined classes in various towns.

The figures for *John Bull* only were: Cost £137. Replies 193. Course enrolments 71. Replies have continued to come in since that date, and are still doing so.

A complete table of all advertising and publicity undertaken by B.E.A. and some groups during the last three years was also produced, and has since been sent to all members of the Council. This showed that our recent advertising had given **far better results** than any other in the period mentioned, and after full discussion the committee decided to recommend to the next Executive Committee meeting: **That from normal advertising expenditure another advertisement should be placed in "John Bull" in January;** and to the next Council meeting: **That a Special Appeal for a still better campaign in autumn 1957 be launched with a target of £500.**

The first recommendation was duly approved, and the advertisement should appear in the issue dated 12th January and published on the 9th.

The second was approved unanimously by the Council at its meeting on 1st December, and we have every hope that members and groups will give their enthusiastic support, just as they have done this year.

Those members who read the Annual Reports—and this ought to be every reader—will know only too well that for some years B.E.A. has had to report a dwindling membership. It appears to be safe to say now that the corner has been turned, and that this year will show a welcome change. This is doubtless due to the production of a monthly *British Esperantist*, and to the enthusiastic work of many groups and individual members throughout the

country. Let us all carry on the good work, helping to spread Esperanto, and by our efforts and financial support make the B.E.A. the most vigorous national Esperanto association in the world.

We earnestly appeal to all who can to give the 1957 Advertising Fund a good send-off by sending an early donation. What better Christmas or New Year gift could you make to the B.E.A. ?

C.C.G.

HOLIDAY PARTIES, 1957

As scarcely any interest has been shown by readers, the parties to Belgium and Denmark (see page 145, November) will not take place. Very little interest has been evinced in possible arrangements for parties to the Congress in Marseilles, but we repeat the information so as to give readers one more chance. If you are definitely interested, please advise the B.E.A. **before 15th January**, as parties will be arranged only if there seems likely to be sufficient support to warrant the risk and additional work involved.

(a) By rail and sea, via Dover, Calais, Paris, leaving London on Friday morning, 2nd Aug. Return fare approx. £23 1st class, £17 2nd class, including seat reservations and transfer across Paris (both ways). Couchettes both ways approx. £3 12s. extra.

(b) By air all the way, approx. £32 return.

(c) By air to Paris and back, remainder of journey by rail, approx. £25.

We have not yet received information as to the cost of meals and accommodation in Marseilles, but believe that this would be between 30s. and 80s. per day, depending on the type of accommodation required.

If interested, please inform B.E.A. whether *a*, *b*, or *c*, and whether the Congress week only, or an additional week if suitable post-Congress excursions are announced.

MARSEILLE, FRANCUJO

3-10 Aŭgŭsto. 1957



Kotizoj : Ĝis fino de Decembro validas la jenaj kotizoj—kongresano 48ŝ., edz(in)o de kongresano 24ŝ., junul(in)o ne pli ol 20-jara, kaj studentoj 16ŝ.

Aliĝiloj haveblaj ĉe B.E.A., sed bonvolu sendi la afrankon.

Loterio : Estos lotumitaj 36 premioj inter la unuaj mil kongresanoj.

Hoteloj : Provizoraj prezoj de hoteloj en Marseille (nur la lito por unu nokto) : 1a kategorio £1-£3 10ŝ.; 2a kat. 12ŝ.-54ŝ.; 3a kat. 10ŝ.-40ŝ.; 4a kat. 10ŝ.-20ŝ.

Antaŭkongreso okazos en Parizo de 31a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto.

Poŝtkartoj. Koloraj poŝtkartoj de la kongresa insigno estas haveblaj ĉe B.E.A. po 4 por 1ŝ., plus afranko.

Glumarkoj. Glumarkoj multkoloraj de la kongresa insigno ankaŭ povas liveri B.E.A. po 25 por 1ŝ., plus afranko.

Rabatoj : Plenaĝa aliĝinto, kiu estas Individua Membro de U.E.A. rajtas rabaton de 8ŝ., kaj edzino de Individua Membro la duonon de tiu sumo.

Statistiko : Ĝis la fino de Oktobro aliĝis 186 personoj el 21 landoj. (Pasintjare 232 el 17 landoj.)

UNESKO



Foto : J. Casey

Responde al la instigo de la B.E.A., kunlaboranta kun U.E.A., la Londona Esperanto-Klubo aranĝis kunvenon, la 2an de Novembro, por celebri la 10an datrevenon de la fondiĝo de U.N.E.S.K.O. Oni montris du filmstriojn, kiuj ilustras la laboron de U.N.E.S.K.O., kaj dekduon da foto-afiŝoj.

S-ro Gething, la Prezidanto de la Klubo, klarige komentis dum la montrado de la filmstrioj, kaj la proksimume 60 ĉeestantoj varme aplaudis la strebojn de U.N.E.S.K.O. en diversaj partoj de la mondo. Gratul-letero en la nomo de la Klubo estis poste sendita per aerpoŝto al la Ĝenerala Direktoro de U.N.E.S.K.O.

La foto montras (de maldekstre) D-ron I. Lapenna, Ĝenerala Sekretario de U.E.A., S-ron W. A. Gething, kaj S-ron H. Holmes, O.B.E., Vic-Prezidanto de U.E.A.

MESSAGES FROM THE EDITOR

To young readers : Several times we have been asked (nearly always by older readers) to include a page of items for young readers of the age group 14-21, but nobody seems to know just what they would like. Will some of our younger readers please be good enough to send me a short indication of what they would like to see in our journal, bearing in mind the fact that there cannot be a lot of space devoted to any one subject. My address is on cover page 2.

To all readers : The Officers, Staff, and your Editor join in wishing you all a Joyful Christmas and a Happy and Prosperous New Year.



LOCAL NEWS



Birmingham. Unu el la lokaj "18-plus" kluboj invitis nin alparoli la anojn pri Esperanto. F-ino Robins kaj S-ro Wharton faris bonajn enkondukajn paroladojn, kiuj kaŭzis viglan diskuton, kaj ni akceptis inviton viziti la klubon je estonta dato.

Iu junulo, kiu respondis al la reklama kampanjo, jam skribis al mi leteron bonstilan en Esperanto, kaj eĉ interparolis kun mi senhezite! Ĉu la kampanjo jam naskis estontajn estraranojn?

Okaze de nia lasta klubkunveno ni havis la plezuron aŭskulti paroladon de nia Prezidanto, S-ro Oliver, kiu bone inspiris nin revivigi la Zamenhof-an entuziasmon. *A. Mo.*

Bournemouth. Diservo okazas en Friends' Meeting House, Avenue Road, la unuan Dimanĉon en ĉiu monato, je 3.30 p.m. Je la 6a de Januaro gvidos ĝin S-ino F. M. Taconis.

London. Diservo en Esperanto okazos en la Franca Protestantata Preĝejo, Soho Square, W.1, je 3.15 p.m. la 13an de Januaro. Kondukos S-ro Debenham; orgenludos S-ro Gentle. Terondo ĉe la Hotelo Ivanhoe.

On 30th October, in the Conway Hall, Mr. John Leslie addressed a meeting arranged by the South Place Ethical Society on Esperanto. The enthusiastic discussion which followed showed that the subject, when competently presented, can hold the attention of an audience accustomed to hearing speakers of high reputation.

Mr. Leslie is prepared to consider invitations to address public meetings in other parts of the country.

Also at the end of October, Mr. A. W. Rowe gave a talk on Esperanto at a meeting of the Walthamstow Round Table. Many questions showed the interest taken, and a really excellent report appeared in the local paper.

Luton. La Lingvista Klubo ĉe Vauxhall Motors havas Esperantan sekcion. Antaŭ nelonge la klubanoj faris diskubandon kaj sendis ĝin al la Opel Fabrikejo en Germanujo. Ĝi entenis, kun aliaj paroletoj, salutojn kaj bondezirojn en Esperanto parolitajn de S-ro J. Taylor. Aŭdinte ĝin, Esperantista laboristo ĉe la Opel Fabrikejo sendis al li interesan leteron. kaj korespondado komenciĝis inter la du. Raporto, kaj foto de la "Linguist" klubanoj, aperis en la *Vauxhall Mirror*.

Maidstone. En Aylesford County Secondary School, apud Maidstone, ĵus komenciĝis Esperanta Grupo nedeviga, kiu kunvenas Marde post lernejoj horoj. La geknabojn instruas F-ino P. M. Mayhew kaj S-ro D. G. Hill, instruistoj ĉe la lernejo. La lernejo havas kontakton kun lernejo en Calais en kiu stariĝis simila Esperanta klubo.

Nord-Kimrujo. Nia lasta kunveno, la 13an de Oktobro en Chester, estis la plej sukcesa ĝis nun. Inter aliaj eroj, post aferkunveno kaj temaĝo, estis la prezentado de filmoj pri la Kongresoj en Pollando kaj Jugoslavujo de nia Prezidanto, S-ro G. Bevan.

“LA UNUAJ”

Memore al Zamenhof-tago, la 15an de Decembro

- Unua Libro* de Esperanto estis lernolibro por Rusoj, eldonita la 14an de Julio 1887.
- Unua adresaro* : 1889 en Varsovio kun 1,000 nomoj de Esperantistoj.
- Unua artikolo* pri Esperanto, 7an de Aŭgusto 1887 en Pola ĵurnalo.
- Unua Diservo* kun E-lingvaj kantoj : 26 Oktobro 1896 en Smolensk.
- Unua dramo* originala : “Gustav Vasa” de R. Schmidt en 1910.
- Unua filmo* Esperanta : la entombigo de Zamenhof prezentita 17 Aprilo 1917 en Varsovia kinejo.
- Unua gazeto* : 1 Septembro 1889 : “La Esperantisto” en Nürnberg.
- Unua geedziĝo* inter diversnacionoj pere de Esperanto : 1889 en Abo inter V. Langlet kaj S. Blomberg.
- Unua insigno* estis fabrikata 1894 en Odessa.
- Unua interparolo* en E. : 1887 en Varsovio inter Zamenhof kaj Grabowski.
- Unua interparolo inter diversnacionoj* : 1889, kiam la Rusa Postnikov vizitis Francujon.
- Unua interŝtata rekono de E.* : 1924 “klara lingvo” por la telegrafo, proponita de la Ligo de La Nacioj, kaj 1925 akceptita de la Univ. Telegrafa Unuiĝo.
- Unua Kongreso* : 1a Universala Kongreso 1905 en Boulogne-sur-Mer.
- Unua korespondado internacia inter infanoj* : 1903, aranĝita de instruistoj Ĉejka (Moravujo) kaj Ducommun (Svisujo).
- Unua kunveno internacia* de E-istoj : 7–8 Aŭgusto 1904 en Calais kaj Dover.
- Unua lektoro* de E. : 17 Aprilo 1917 J. Schamanek ĉe Teknika Altlernejo en Vieno.
- Unua literatura konkurso* : 1896 en Petrogrado.
- Unua ministro*, kiu parolis en E. : 1911, Conybeer, dum la 1a Aŭstralia E-Kongreso.
- Unua monumento* de Zamenhof : 1914 en Franzensbad.
- Unua oficiro*, kiu havis permeson uzi E-an distingilon : 1917, Saldanha Carreira, Portugalujo.
- Unua opera prezentado* : 1912 dum la U.K. en Krakow “Halka”.
- Unua poemo* originala : 1887, “Mia penso” de Zamenhof.
- Unua poŝtmarko* kun E-a teksto : 1925 en Sovetio.
- Unua poŝtstampo* E-a : 24 Aŭgusto 1913 dum la U.K. en Bern.
- Unua prediko* : 1906 en la 2a U.K. en Genève, Pastro Rust.
- Unua preĝlibro* : 1893 de L. Beaufront.
- Unua romano originala* : 1907, “Kastelo de Prelongo” de Vallienne.
- Unua senfadena telefonparolado* : 3 Aprilo 1930 inter A. Couto Fernandez, Rio de Janeiro, kaj E. Houbart, Paris.
- Unua societo E-ista* : Decembro 1888 en Nürnberg.
- Unua strato* de Zamenhof : 1912 en Sabadell, Hispanujo.
- Unua ŝtato* kiu reprezentigis sin ĉe E-a Kongreso : 1907 Belgujo.
- Unua teatra* prezentado : 27 Septembro 1896 en Smolensk, Rusujo.
- Unua telegramo* laŭ la akcepto de E. kiel klara lingvo : 1 Novembro 1926 de Brita E.A. al la Radio-Ekspozicio en Dublin.
- Unua vojaĝo* per E. : Svedaj studentoj V. Langlet kaj Etsel al Rusujo.

Laŭ la *Enciklopedio de Esperanto*.

PRUDENTA PROPAGANDO

En la aŭtuna numero de *Norda Prismo* aperis 5-paĝa lukse ilustrita artikolo "Ekspedicio Sahara," kun sub-titolo "Verda Fronto kontraŭ la dezerto," de Richard St. Barbe Baker.

En klariga kadro la redaktoro de *Norda Prismo* skribas — "Richard St. Barbe Baker gajnis por si la reputacion esti la plej bona vivanta aŭtoritato en la anglalingva mondo pri la superega valoro de la arbar-kulturo de la vidpunkto egale de pejzaĝa belo, ekonomia graveco, superrega klimata influo kaj homa sano . . . rimarkinda homo—homo de vasta scio (akirita en multaj landoj de la mondo), elstara kulturo kaj penetra vizio. Mem la suba artikolo estas interesa interŝanĝo. La angla revuo *Trees and Life* transprenis la artikolon de D-ro P. Neergaard 'Fluganta Semo', kaj ni ricevis la rajton de la altprestiga aŭtoro kaj redaktoro aperigi la jenan priskribon."

Fakte la artikolo "Fluganta Semo" aperis en angla traduko en la aŭtuna numero de *Trees and Life*, kaj la redaktoro aldonis noton pri la laboro kaj alta reputacio de D-ro Neergaard rilate kaj al agronomio kaj al Esperanto.

John Leslie tre kompetente tradukis ambaŭ artikolojn kaj fakte aranĝis la interŝanĝon; do, li faris vere neordinaran propagandon, pri kiu ni devus sincere gratuli lin.

Sed li ne estis kontenta halti tie! Por la asocio *Men of the Trees*, de kiu St. Barbe Baker estas la inspiranta gvidanto, li tradukis esperanten "La Carton de la Nova Tero", kaj ankaŭ tiu aperis en la revuo *Trees and Life*. Ĝuante intiman kontakton kun St. Barbe Baker, John Leslie akiris de li specialan inviton al la Londona Esperanto-Klubo, ke la membroj okupu rezervitajn sidlokojn ĉe alt-nivela prelego pri La Sahara, en la bela Caxton Hall, en centra Londono. Kvardek membroj de la Klubo,

portante siajn verdajn stelojn, ĉeestis kaj sidis amase, kaj la flata aludo, kiun faris pri la Esperantistoj St. Barbe Baker, elvokis entuziasman aplaŭdon de la proks. 300 ne-Esperantistoj. St. Barbe Baker ankaŭ anoncis la dissendon de kopioj de la "Ĉarto" al Esperantistaj Organizaĵoj tra la mondo, kun peto, ke ili traduku ĝin en la nacian lingvon.

Vere profitdona propagando, ambaŭflanke!
W.A.G.

La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj atentigas, ke ĝia Paska Lernejo (vidu Novembran *British Esperantist*) okazos tuj post la Kongreso en Weston-super-Mare, kaj en ties proksimeco. Jen bonega okazo, sed oni ne povas garantii lokon post la 5a de Januaro. Kosto proksimume £4 10ŝ. 0p. Informoj (kontraŭ afrankita koverto) ĉe F-ino O. Robotham, 14, Wensley Road, Stockton-on-Tees, Co. Durham.

Aldone al la programo jam anoncita por la Decembra Konferenco estas parolado de F-ino Sybil Lock (Bristol) pri siaj spertoj en Ŭsona lernejo dum unu jaro.

The late Canon W. H. Harris, M.A., B.Litt., was Canon-Treasurer of St. David's Cathedral; Professor of Welsh, Senior Tutor, Welsh Librarian, and Lloyd Williams Fellow of St. David's College, Lampeter. A Memorial Fund has been organised, and it is intended to provide a memorial of a permanent nature in the chapel of St. David's College, Lampeter. All donations may be sent to The Bursar, St. David's College, Lampeter, Cards.

The Welsh Key. Some members have been sending orders for this direct to the printers, who now have no stock. Orders should be sent to the B.E.A., or to Mrs. Langtree, Melbourne House, Gwynfryn, Nr. Wrexham, N. Wales.

THE BRITISH ESPERANTIST



with which is incorporated

INTERNATIONAL LANGUAGE

1955—1956

51ST AND 52ND YEARS

Editor : CECIL C. GOLDSMITH

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11

TABELO DE ENHAVO

(*Steleto * montras la jaron 1956*)


- Advertising Campaign, 49*, kaj ĉiu
posta numero.
- Artfesto, Rezulto de la, 74*.
- B.E.A.—26, 87, 155*. A.G.M., 22,
40, 70*. Annual Circular, 22, 38*.
Annual Report, 18, 34*. Artfesto,
1, 11, 74*. Congress (Swanwick),
38, 36*, 65*. Correspondence
Courses, 19, 35, 37*, 82*. Exami-
nations, 19, 36* (see also R.S.A.),
Finance, 18, 24, 35*, 40*. Groups
and Federations, 19, 35*. Propa-
ganda, 20, 37*. Subscriptions and
Membership, 18, 34*.
- Bindilo por la *B.E.*, 109*
- Bibliotekoj kaj Esperanto, 39, 46.
- BIOGRAFIAJ NOTOJ—Boulton, M., 62.
Buchanan, J., 129*. Butler, M. C.,
73, 63*. Capp, C., 21. Collis, G. E.,
70. Durrant, E. D., 21, 68. Gentle,
L. I., 15. Gething, W. A., 37.
Geoghegan, R., 107. Grocott, Ges.,
112*. Harding, G., 125*. Harris,
W. H., 86. Holmes, H. W., 61.
Holt, E., 112*. Houghton, C. M.,
21. Leslie, J. W., 21, 100*.
Menendez, M. F., 2*. Merrick, F.,
12, 14, 49, 27*, 98*. Neal, R., 35.
Oliver, A. C., 35, 41. Privat, E.,
26. Rhodes, J., 13*. Ryan, J. S.,
119*. Shakespeare, W., 20*.
Stuttard, M., 48*. Venture, A., 37.
Wadham, Ges., 44. Yelland, E. E.,
77*. Yuile, M. S., 13. Zamenhof,
L. L., 117.
- Blackpool, E-a semajnfino, 112.
- Blankenberg, Karavano al, 99*.
- Blindaj Esperantistoj, Brita Asocio
de, 98*.
- Boulogne-sur-Mer, Pilgrimo al, 56.
- British Esperantist, The*, 19, 35, 68,
35*.
- Burnley E-a Societo, 86*.
- Butler, M.C., Lectures by, 73, 63*.
- Da Kapo, 63.
- Danaj Vikingoj, Pri, 3*.
- Denton, Ekskurso el, 123.
- Diristino de l' Sorto, La, 131.
- EDZIĜOJ — Boyes - Strutt, 61.
Grdanović-Uršić, 114. Langman-
Boyce, 16*. Odendaal-Veness,
128*. Preston-Rhydderch, 57*.
Strutt-Long, 157*. Taylor-Scott,
95*. Wilson-McConnell, 157*.
- Elsinore, Karavano al, 115*.
- Esperanto House, 35.
- Estonta Laboro de B.E.A., 155*.
- Examination for Schools, 79.
- Ferio de Eraroj, 123.
- Festo de la Libro, 102.
- Holland, International Week in, 193*.
- I.L.E.I., 73.
- Infanaj Desegnoj, Ekspozicio de, 149*.
- John Buchanan Prizes, 73, 89, 127*,
129*.
- Keighley Group, The, 13*.
- Kongreso en Kopenhago, La, 117*.
- Konsilantaro de Eŭropo, 71, 103, 69*,
83*, 84*.
- Kooperativa E-a Ligo, 151*.
- Kristnaska Fantomrakonto, 31*.
- Lektorata Jubileo, 15*.
- Lewes, 94*.
- LINGVAJ NOTOJ—Adjektiva Malsano,
La, 29*. **Certa**, 30*. **Floti**, 3.
Foje, 30*. *Fundamenta Krestoma-
tatio*, 47. **I**-Correlative-boycott,
The, 30*. *Ilustrita Vortaro*, 42*,
110*. Infinitivo aktivasenco post
komplemento, 9. Interjections, 5.
Lasi -i, 9. Misuzo de Esperanto,
104, 9*. Neologisms, 3. Novaj
prepozicioj, 54*. Onomatopaeic
words, 3. Predikata pronomo, 9.
Radikoj dubesencaj, 2. Substantivo

- anst. adjektivo, 95. The Supplement to the P.V., 2. Verbigo de adjektiva radiko, 48, 124*.
- Liverpool University kaj Esperanto, 129*.
- Lumo Ĉiela, 15*.
- Malgranda blua aŭtomobilo, La, 82.
- Malnova Angla kutimo, 23*.
- Malnova Turhorloĝo, 55*.
- Mano, La, 42.
- Manoj de Silvio Brown, La, 91*.
- Marseille, Kristnasko en, 169*.
- Marseille, U.K. en, 162*.
- Modern Language Association and Esperanto, 58.
- MORTOJ — Andrews, L. C., 112*.
- Baggs, E. T., 95*. Bailey, H. T., 61. Baldwin-Smith, E., 30*.
- Broadway, Sino B. J., 95*.
- Broughton, F. E., 44. Bullivant, H. T., 36. Butler, G. W., 143*.
- Davis, C. M., 114. Edwards, A. B., 172*.
- Eljot, J., 157*. Flugel, J. C., 84. Gambles, G. W., 114. Gauntlett, G. E., 172*.
- Goulding, S-ro, 44. Griffiths, G. R., 157*.
- Hanbury, F., 44. Harris, W. H., 30*.
- Hayes, M. E., 112*.
- Hodges, J. A., 36. Holden, J., 84. Hoyle, J., 95*.
- Hurley, A., 57*.
- Jackson, H. M., 130. Jayne, E. K., 112*.
- Kirby, S. E., 44. Laing, J., 128*.
- McCallum, A., 172*.
- Merrick, W. P., 130, 16*.
- Montoro, E. Di, 95*.
- Oldrey, F. G., 61. Partington, J. F., 61. Partridge, R., 36.
- Pierce, J., 61. Rodgers, J. D., 128*.
- Saunders, E. C., 30*.
- Saunders, W. S., 36. Sewell, H., 57*.
- Sexton, F. P., 130. Sharpe, W., 16. Slade, T. K., 57*.
- Stather, H., 84. Stay, H., 143*.
- Sumfield, V. V., 112*.
- Trickey, R., 84. Waite, L., 128*.
- Wallis, W., 112*.
- Westmancote, J., 172*.
- Wetherell, I. B., 16.
- Piratoj kaj Farmacio, 107*.
- Plena Cirklo, 97.
- Promeno tra Bolonjo, 30.
- Propaganda Statistiko, 73.
- Prudenta Propagando, 166*.
- Radio kaj Esperanto, 59, 72, 10*, 142*, 152*, 170*.
- RECENZOJ—Adam Mickiewicz, 27*.
- Agoriad Esperanto, 153*.
- Britain and Ireland, 46*.
- Ĉarpentiloj, 105*.
- Dialekto, dialektigo, 105*.
- Ek-rigardo al Budhismo, 135*.
- Elektitaj Prelegoj, 124*.
- El la Maniko, 92, 127.
- En Ĉinio batalanta, 54*.
- English Stories for Translation and Comprehension, 167*.
- English-Esperanto Chemical Dictionary, 88*.
- Eseoj I, 134*.
- Esperantisk-Svensk Ordbok, 7.
- L'Espéranto facile, 11*.
- Esperanto Vocabulary, 167*.
- Ezopa Saĝo, 123*.
- Fianĉino de Olivetan, La, 109.
- Fundamenta Krestomatio, 47.
- Ilustrita Vortaro de Esperanto, 42*, 110*.
- Infana Raso, La, 154*.
- Internacia Lingvo, La, 29.
- Josip Broz Tito, 6.
- Kapao, La, 79.
- Koko krias jam, 125.
- Kontralte, 25*.
- Ludiloj: dua ABC-libro, 26*, 61*.
- Malmö, Kluba E-a Biblioteko, 105*.
- Malprudenta Scivolulo, La, 125.
- Martin Krpan, 93.
- Matematika Terminaro, 78.
- Militista Vortareto, 108.
- Ni en Skandinavio, 123*.
- Ni oferas, 109.
- Nøkkel til Esperanto, 153*.
- Pollando, 138*.
- Rozoj kaj Urtikoj, 60.
- Senpera Verbigo de Adjektivoj, La, 124*.
- Sinjoro Tadeo, 88*.
- Suplemento al la P.V., 2, 8.
- Sveda Poemaro, 78.
- Tartarin de Taraskono, 53*.
- Teatro en Societo, 168*.
- Vivu la Stel', 105*.
- Vojo de la Vero, La, 135*.
- Wörterbuch Deutsch-Esperanto, 7.
- Zinnoo Sjootoo. Ki, 6.
- Revo realigita, 77*.
- R.S.A. Ekzamenoj, 36, 136*.
- Sanktulo kun Ombrello, 113.
- S.B.E.T., 28, 55, 18*, 66*, 75*, 166.
- Skolta E-ista Ligo, 66*.
- Oratorio en Esperanto, 15.

Skota Kongreso, 56.
Strasburgo, Impresoj el, 83*.
Student's Page, 77, kaj ĉiu posta
numero.
Sudorienta Federacio, La, 101*.
Teacher's Scholarship, 12.
Temple Lernejo kaj Esperanto, 75,
7*, 138*, 149*.
Tial ne zorgu, 59*.
Tri malsanoj de E., 29*.
Tri semajnoj en Esperantujo, 80.
U.E.A., 20, 35, 41, 68, 36*.

Unesko kaj Esperanto, 18, 163*.
Unuaj, La, 165*.

Valentino, La, 27*.
Venĝo de Serĝento Merco, La, 139*.
Venĝo por la Vikingoj, 133*.
VERSAĴOJ—Japaneskoj, 2*. Kongresa
Konfeso, 72*. Longa Muso, 116*.
Mont-Majo, 45. Pensoj pri Infan-
eco, 65. Say not the struggle
naught availeth (and translation),
96. Zamenhof, 117.
Veterana E-ista Klubo, 160*.



***An Esperanto Vocabulary**, compiled for the Society of British Esperantist Teachers by Miss E. W. Tegg, C. Veness and J. H. Sullivan. 5½ in. × 3 in.; 100 pages; price 1s. 9d., post 3d.

At last we have to hand this badly needed vocabulary for children. How tired teachers of Esperanto must have become with reading "well" translated as *puto*, "was tired" as *radringis*, "she started her work" as *ŝi ektremis sian laboron*. Where an English word has more than one meaning, the word is used in a sentence or phrase so that mistakes of this nature are eliminated.

The type is exceptionally clear and the actual words large, while the meanings in small type are easily legible. The size is a further pleasing feature, just right to slip into the pocket but not too small to be missed.

One or two small criticisms can be made. For example, one reads *sanĉo* and *bonsanĉo* for *ŝanco*, etc.; *mapo* for "map", whereas *landkarto* would be more international; *dek post la sesa* for "ten past six" seems like an Anglicism. A loaf is more usually translated *pano* (cf. French *un pain*, German *ein Brot*); *paĵto* would be better than *0.6 litro*, and the sentence "we cannot afford that" would be less cumbersome if translated as *mi ne povas tiom elspezi*.

All who have worked on this booklet can rest assured that they have done a good job. Children and students alike will delight in using this book, and it should also be a help to foreign Esperantists who are learning English.

H. Melton.

NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A. others from the addresses given

Verkojn recenzotajn oni bonvolu sendi po du ekzempleroj al la Sekretario, B.E.A., 140, Holland Park Avenue, London, W.11: ne al la Redaktoro.

***Gramofona Disko**: *La kultura valoro de la Internacia Lingvo*. Parolata de D-ro Ivo Lapenna. 45 rondiroj minute; kun presita teksto. Eldonis U.E.A., Rotterdam. Prezo 12s. 6p., afranko 6p. Mendebla pere de B.E.A.

Finfine estas havebla disko, per kiu oni povas aŭskulti al Esperanto modele parolata. Tamen la disko ne celas speciale instrui la prononcadon, kaj ĝia enhavo estas inspira kaj instiga mesaĝo por progresintoj. Ankaŭ al la progresanto ĝi estas rekomendinda kiel helpilo; kaj kiel propagandilo inter ne-Esperantistoj, kiuj ofte kredas ke la lingvo nepre sonas barbare, ĝia valoro estas senduba.

***English Stories for Translation and Comprehension**. Compiled by H. L. Lee. The Epworth Press, London. 96 pages; price 3s. 6d., post 5d.

It has unfortunately been the experience of many translators from English into Esperanto to feel a little ashamed of the quality of their published work. When undertaking the translation, they probably had insufficient command of the language and had not given themselves sufficient practice. Here is a useful book for the latter purpose. It consists of short anecdotes and stories, of which the majority are between 100 and 300 words in length. Since the translation of each piece occupies relatively little time, it is a suitable work for use in advanced courses. Also the lone student, who can usually find a more experienced Esperantist to check his work, can make good use of this book.

A specimen story, by kind permission of the publishers, appears elsewhere under the heading "Translation Competition."

***Teatro en Societo.** Eldonita de Kroata Esperanto-Servo, Zagreb. 84 paĝoj broŝ.; prezo 4ŝ., afranko 3p.

Dum la lastaj dek jaroj la grupo en Zagreb, volante prezenti teatraĵojn, kaj trovante—kion certe trovis aliaj grupoj—ke mankas teatraĵoj en la ekzistanta Esperanta literaturo, fondis Literaturan Sekcion por provizi taŭgan materialon. Okaze de la deka datreveno de la grupa fondiĝo estas eldonita la supra libro, kiu enhavas dek du teatraĵetojn, parton de la frukto de ĉi tiu sekcio. Ĉi tiuj ne pretendas grandan literaturan valoron, nek celas riĉigi nian kulturon; sed mi ne dubas, ke, lerte prezentitaj, ili ĝojigos aŭdantaron, kaj trovos varman akcepton en multaj kluboj kaj grupoj. Se la apero de ĉi tiu modesta libro instigos aliajn grupojn eldoni siajn tradukitajn kaj originalajn verkojn (ĉar sendube tiaj verkoj jam ekzistas) tio estos plua kaŭzo gratuli la Zagreban klubon.

La lingvo ĝenerale estas simpla kaj flua; sed laŭ mi estas eraro meti neologismon, kiel "povra", en la buŝo de Zamenhof. Bedaŭrinde tro da preseraroj makulas la libron.

K. Alexander.

De Esperanto-Missionen. Klackavägen, Nora stad, Svedujo, ni ricevis kelkajn flugfoliojn: priskribo pri la misio mem; *La Navigantoj* pri Biblia studado kaj kristanigo; *Jönköping* priskribo pri la Sveda urbo; *Evangelia Serio 7* geknaba specialnumero.

Kalendaro 1957. Faldita karto kun monatoj kaj tagoj. Eldonita de S.A.T. Havebla ĉe E. Lewis, 3, Ashdown Road, Epsom, Surrey, po 2½p. (plus afr.).

Schatzkästlein Tegernseer Tal—turisma prospekto kun Esperanta aldono "La Valo de Tegernsee". Ilustr. Senpage havebla ĉe F-ino Anna M. Orterer, (13b) Kreuth bei Tegernsee, Rathaus, Germanujo.

TRANSLATION COMPETITION

Test Piece No. 7

From the days of sailing ships comes the story of a vessel making the crossing between Liverpool and New York when a storm of exceptional violence arose. Struck suddenly in the darkness by the gale, the ship suffered much damage, her masts being crippled, the vessel plunging so violently that the passengers expected to be drowned any moment.

Amid the tumult and panic, the captain's daughter, a child of eight, slept soundly till the crashing of an immense wave on the foredeck shook the vessel so terribly that she awoke in alarm. "It's the storm, darling," said her mother, trying to hide her own terror. "We've run into a gale."

"Where's Daddy?" the child asked.

"Daddy's quite all right," replied the mother soothingly. "He's at the helm."

The child lay down again. "Oh," said she happily, "if Daddy's at the helm I needn't worry."

A minute later she was sound asleep, and sound asleep she remained till morning brought calmer seas.

From *English Stories for Translation and Comprehension* compiled by H. G. Lee (The Epworth Press).

Readers are invited to translate the above text into Esperanto. Translation should be sent in an envelope marked *Traduko* and arrive at the B.E.A. Office before 21st January next. Books to be chosen from the B.E.A. Book List to the value of 10s. 6d. will be awarded to the sender of the best translation, if sufficient entries are received. The result will be announced in the March issue of *The British Esperantist*.



KRISTNASKO EN MARSEILLE

NE ekzistas lando en la mondo kie Kristnasko estas festata kun tiom da entuziasmo kiom en la suplena Provenco. Kun ĝiaj uriozaj kutimoj, ĝiaj jarcentaj radicioj, en kiuj harmoniiĝas la mistero de la Naskiĝo kaj la ritoj de la tablo, estas la festo de la hejmo.

Kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko la patro, aŭ familiano, komencas konstrui la *Crèche*. Tiu grava laboro eblas esti farita kune, kaj ĉiu devas unlabori; la plej vasta fantazio rovas liberan elfluon, sen malroksimiĝi de la simbola temo, kiu eprezentas la naskiĝon de Kristo.

La *Crèche* ĝenerale montras vilaĝon sur monteto, meze en kiu fontas orienteto el arĝenta papero super kiu endas primitiva ponteto. Malfacilaj ojetoj, abruptaj deklivoj, apartenas al la pejzaĝo. La pintaj rokaĵoj estas aritaj per gluita papero sur rabotitaj gneroj. Ne mankas la akcesoraĵoj kiuj vivigas vilaĝon: miniaturaj arboj, domoj el kartono, muelilo, aŭto, lavejo. Ĉio konstruiĝas laŭ persona gusto kun pulvoraj, akvaj, ŭ gluaj farboj. Kelkaj ovoŝeleroj rte ŝajniĝas neĝon sur la rokoj. La *crèche* estas lokita en la manĝosalono. Ĝi aldonas sanktuletojn, la grandajn nuarange, la mezajn centre, kaj la liputajn sur la altaĵoj.

Sankta Francisko el Assisi estas konsiderata la patro de la *crèche*. Ekde la XVIa jarcento oni renkontas iujn simbolajn vilaĝetojn en la reĝejoj, sed estis en la XIXa jarcento, ke ili populariĝis ĉefe en Marseille. De trideko da jaroj konkursoj de familiaj kaj preĝejaj *crèche* organiziĝas ĉiujare kun granda akceso.

Laborpeza por la dommastrino estas la antaŭkristnaska tago! Ŝi devas prepari la faman festan manĝon un la specialaj ingrediencoj. Jen

ni ĉe la festa manĝo. Oni elvokas la ĝojojn kaj malĝojojn de la pasinteco. Forgeso de malkonsentoj, festo de memoraĵoj pri la mortintoj, tia estas Kristnasko. Oni metas tri tablokovrilojn, sur kiujn oni instalas tri kandelingojn simbole de la Sankta Triunuo: la tablo estas ornamita per verdaĵoj. Granda pano tronas en la mezo, reprezentante Kriston, kaj dek du malgrandaj panoj reprezentas la apostolojn. La tradicio postulas, ke tiu tablo ne estu malpreparita dum tri tagoj, t.e. la 24a, 25a, 26a de Decembro.

La solena momento alvenas. La plej maljuna kaj la plej juna el la kunvenintaro envenas kun girlandita stumpo de olivarbo, kaj, tenante ĝin ĉe la ekstretoj, trifoje ĉirkaŭiras la tablon kaj metas ĝin en la kamenon. La maljunulo jetas kelkajn gutojn da vino sur la flaman lignon. Ĉiuj gastoj ripetas la geston dum el la lipoj de la maljunulo falas la sanktaj vortoj, "Ĝojo, Ĝojo. Dio ĝojigu nin. Dio donu al ni la gracon vidi la novan jaron!" Estas simbolo en la ceremonio, ke la lignostumpo reprezentas la Savanton, kiu konsumiĝas, kaj sufero forigas la erarojn de la homoj.

Oni altabliĝas. La plej maljuna prezidas kaj, preninte la grandan panon, signas krucon sur la krusto kaj distranĉas ĝin en tiom da pecoj kiom da gastoj. La pecoj, laŭ la legendo, protektos la posedanton kontraŭ damaĝoj. Granda peco estas rezervita por la unua malfeliĉulo kiu prezent-iĝos. La manĝo komenciĝas meze de komuna ĝojo. La plej atendita programero estas la alveno de la dek tri desertoj. Estas la sola fojo dum la jaro, ke la infanoj povas servi sin mem. La ĝojo eksplodas en Kristnaskajn kantojn antaŭ la lumigita *crèche*.

La infanoj enlitiĝas, tamen ne sen meti la ŝtrumpon sub la kamenon, ĉar la longbarba Patro Kristnasko, ŝarĝita per ludiloj kaj per ĉiuspecaj dezirindaĵoj, venos dum la miroplena nokto por kompensi ilin laŭ iliaj meritoj. Kaj estas ankoraŭ ĝojo de la hejmo la sceno ĉe la vekigo la morgaŭan matenon, kiam la karaj infanetoj kuros certiĝi ĉu Patro Kristnasko kontentigis iliajn dezirojn; ĝojkrioj, surprizaj mienoj, amaraj seniluziigoj, skeptikismo ĉe iuj.

La kloŝoj karijonas gaje por la noktomeza Meso. La bela ceremonio

per sia mistikismo kaj soleneco altiras la popolamason. En Marseille, en la preĝejo Saint-Laurent situita en la centro de la fiŝkaptista kvartalo, la noktomeza Meso havas originalan karakteron pro la ofero de fiŝoj, kaj la arkaikaj kantoj broditaj sur malnovajn Provencajn ariojn.

La morgaŭa tago apartenas al la infanoj. Oni instalas la Kristnaskan arbon en la societoj, en rondoj, en lernejoj. Estas la tago kutime elektita por ĉeesti la prezentadon de unu el la multnombraj pastoraloj, tiel popularaj en Provenco.

Esperanto en Radio

Aŭskultantoj skribu al la radio-stacioj almenaŭ unufoje monate por konfirmi aŭskultadon; ankaŭ pri ricevsukcesoj al S-ro J. Brownlee, 8, Westbourne Grove, Hexham, Northumberland, kiu komparas kaj raportos. Poŝtkartoj sufiĉos.

Programoj kutime riceveblaj en Britujo

Lundo :	22.40-22.57	Hilversum, aŭ 298 aŭ 402 m. Nur la unuan Landon de la monato. N.C.R.V., Schuttersweg, 8.
Mardo :	11.55-12.00	Bern. 48.66, 31.46 m. Neuengasse, 23.
	17.35-17.40	Bern, same.
	17.55-18.10	Romo. 50.34, 41.24, 30.90 m. Casella postale 320.
	19.00-19.15	Stockholm. 26.10, 19.90 m. I.B.R.O., Poŝtfako 822 (nur la lastan Mardon de la monato).
Merkredo :	17.55-18.10	Romo—kiel Marde.
	22.50-22.58	Hilversum, aŭ 298 aŭ 402 m. V.A.R.A., Heuvellaan 33.
Ĵaŭdo :	11.55-12.00	Bern—kiel Marde.
	17.35-17.40	Bern—kiel Marde.
	22.45-23.00	Zagreb. 264 m. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo :	17.55-18.10	Romo—kiel Merkrede.
Sabato :	22.15-22.22	Hilversum, aŭ 298 aŭ 402 m. K.R.O., Emmastraat 52.
Dimanĉo :	23.35-24.00	Bilbao. 265 m. Radio Bilbao, Hispanujo.

Horoj, laŭ G.M.T. Adresoj supre, al kiuj oni skribu pri ricevo. Je pli da Esperantaj leteroj, aŭ poŝtkartoj, des pli da Esperantaj programoj.

Se iu scias pri aliaj Esp.-programoj aŭdeblaj en Britujo, bonvolu sciigi S-ron Brownlee. Li plendas ke ĝis 24-a de Novembro nur tri personoj skribis pri rezultoj. Ĉu la Britoj tute ne atentis, kaj ne volas subteni la jam atingitajn sukcesojn per radio ?



STUDENTS' PAGE

Correspondence in connection with this page should be sent to
W. A. Gething, 6, Highmore Road, London, S.E.3

Tasko por Kristnasko

Skribu solvojn sur apartan paperon kaj sendu al mi ĝis 1 Januaro, 1957. Premioj estos aljuĝataj (1) al komencanto studinta ne pli ol du jarojn kaj (2) al progresinto, kiuj ensendas la plej bonajn solvojn. Indiku vian nivelon.

1. Krucvortenigmo preparita de John Wells



Horizontale : 1. Malkvietigi (R), 4. Ekstra, 7. Havanta inklilon, 8. Plej multe, 9. Numero, 11. Leda strio (R), 12. Instruita, 13. Akragusta vegetaĵo (R), 14. Kovros, 17. Prepozicio, 20. Rapide farita desegno, 23. Acidgusta herbo (R), 26. Rompitaĵoj (R), 27. Havi efektivan rezulton, 29. Tropika grimpanta vegetaĵo, 31. Kaprica kutimo (R), 32. Numera adjektivo, 33. Moviĝi al loko (R), 34. Porda ŝtono (R), 35. Stila figuro (R).

Vertikale : 1. Kare ŝati, 2. Sen-

planda piedvesto (R), 3. Havas en la mano, 4. Konservi en salo, 5. Tute simila (R), 6. Spirebla gaso (R), 7. Arbeti kun rozaj floretoj (R), 10. Barbhava dombesto (R), 15. Norda cervo (R), 16. Verda loko en dezerto (R), 18. Parto de la kolo (R), 19. Plej malgranda, 20. Teoria figuraĵo (R), 21. Viola floro, 22. Birdo simila al merlo (R), 23. Hostio (R), 24. Afrika infanteriano, 25. Reĝeca besto (R), 28. Prilabori per ŝpato (R), 30. Iu parenco (R).

2. Pri "La Krestomatia," diru :

- (a) En kiuj rakontoj menciigas :
Georgo Felsen, Sinjorino Anneto, Henriko VII de Anglujo ?
- (b) En la poezio : (i) Kiuj enjungigis triope al veturigilo ? (ii) Kio estis la profesio de Van Smisen ? (iii) Kion mi trovis "en la kor' de amiko" ?
- (c) En kiuj fabeloj menciigas—
Kecava, Mahadeva, Ali Hasan ?

3. *Kiu verkis* : — (1) Kastelo de Prelongo, (2) Viktimoj, (3) Landoj de l' Fantazioj, (4) Kontralte, (5) Ezopa Saĝo ?
4. *Faru kiom eble da vortoj* (kun tradukoj) el la naŭ literoj de la vorto *pleonasmo*, ekz. sano, leono.
5. *Subskribu vian nomon kaj adreson.*

W.A.G.

KOMERCAJ LETEROJ

estas utila libro por la studanto.
2/2 afrankite. Mendu ĉe B.E.A.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.

OFFICIAL NOTICES

Hon. President : B. Long, B.A.

President : A. C. Oliver, F.B.E.A.

Hon. Secretary : W. M. Goodes, F.B.E.A. Hon. Treasurer : W. H. Coventry, F.B.E.A.

Hon. Education Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.

Secretary : J. W. Leslie, F.B.E.A.

Registered Office : 140, Holland Park Avenue, London, W.11. Tel. : PARK 7821

Hours : Weekdays 9 a.m. to 5 p.m. ; Saturdays 9 a.m. to 12 noon

NEW JUNIOR MEMBERS

Dodds, K. *South Shields*
Elms, D. G. *R.N., c/o G.P.O., London*

NEW MEMBERS

Allen, H. C. *King's Lynn*
Anderson, J. *Falkirk*
Clark, R. W. *London, S.E.6*
Grimwood, J. D. *Liverpool, 17*
Hicks, C. H. J. *Romford*

SPECIAL ADVERTISING CAMPAIGN

	£	s.	d.
Previously acknowledged ..	359	11	4
Bristol Society ..	5	0	0
Total to 22nd November ..	£364	11	4

DONATIONS TO GENERAL FUNDS

Previously acknowledged : £78 19s. 9d.
4s. 0d. : A. P. Blackwell, E. Hiles.
5s. 0d. : E. H. A. Beck, Miss E. M. Pearson.
5s. 10d. : H. C. Allen.
10s. 0d. : Miss B. Bowell, G. G. Lanham, A. Prince.
11s. 0d. : K. Price.
Total to 22nd November, £82 4s. 7d.

B.E.A. EXAMINATION RESULTS

Elementary Examination— By Correspondence

Humphries, Mrs. I. *Bath*
*Hadgopoulos, G. J. *Lamia, Greece*

* Denotes a candidate who has passed with Distinction.

Nomination of Officers, 1957-58. Members are reminded that they have the right to nominate candidates for election as Officers and Councillors for the ensuing year. Forms of nomination may be obtained from the Secretary. Nominations should be sent in by 31st January, 1957.

Licentiate Examination. An examination for the Licentiate Diploma of the British Esperanto Association will be held during the coming British Congress at Weston-super-Mare, Easter, 1957. Intending candidates should obtain the regulations

and syllabus (6d. post free from B.E.A.) as soon as possible. Attention is drawn to the fact that, in accordance with the regulations, candidates are required to submit a preliminary essay at least four weeks before the examination. Candidates will be notified as to time and place of the examination.

When paying your subscription please read the renewal form carefully and fill it in correctly. J. W. LESLIE, *Secretary.*

Mortoĵ

Edwards. La forpaso de Amy B. Edwards, la 3an de Novembro 1956, estas por multaj, ne nur en Britujo, preskaŭ nekredbla, tiel intime ŝi estas ligita kun la Esperantista vivo.

Kiam en la knabina gimnazio de Bishop Auckland la konata eksperimento pri Esperanto, kiel preparilo por la lernado de la Franca lingvo, komenciĝis en 1919, ŝi estis la instruistino. Rezulte ŝi plene konvertiĝis al Esperanto. Hodiaŭ estas elstaraj en la Movado kelkaj el ŝiaj lernantinoj.

Ŝi estis Prezidantino de S.B.E.T. en 1942-1943, kaj subtenis ĉiam ties diversajn aktivajojn. V.C.N.

Gauntlett. La 29an de Julio mortis en Tokio George Edward Gauntlett, 88-jara. Naskita Brito, li vivis en Japanujo de 1890, kaj fariĝis Japana civitano. En 1906 li organizis korespondan kurson kaj havis kelkcent lernantojn, kiuj formis la kernon de la membraro de la Japana Esperantista Asocio organizita en tiu jaro.

McCallum. Je la 11a de Novembro mortis Alexander McCallum, membro de la grupo en Edinburgh de 1905, kaj bona subtenanto de B.E.A. dum multaj jaroj.

Westmancote, S-ino J., mortis la 25an de Oktobro. Ŝi estis antaŭa kasistino, kaj poste sekretario, de la Bristol Grupo, kaj fervora subtenanto de B.E.A. kaj U.E.A. dum multaj jaroj. La Diservon en Esperanto ĉe la kremaciejo gvidis Pastro Downes.

Sinceran kondolencon al la parencoj de ĵaj forpasintaj kolegoj.

SMALL ANNOUNCEMENTS

2d. per word. Minimum 2s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the B.E.A. Office by the 20th of the month

Kaj la paŝtistoj revenis, glorante kaj laŭdante Dion pri ĉio, kion ili aŭdis kaj vidis, kiel estis parolite al ili. *S-ta Luko 2. 20.*

U.N. army needs Esperanto slogan envelopes: 50 for 2s. 2d., post free. Cox, 4, Rolls Passage, London, E.C.4.

Men of the Trees Society. La Sek. de B.E.A. petas, ke ĉiu Esperantisto kiu estas "fratulo" de la Societo bonvole informu lin. Poŝtkarto sufiĉos.

Taŭga donaco por Kristnasko estas *La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo*, de Charles Dickens, tradukita de M. C. Butler; 120 paĝoj kun multaj ilustraĵoj, luksa eldono tole bindita, 6 ŝil., afranko 1s. 3p. Mendu ĉe B.E.A.

Somera Universitato 1948. La prelegoj de la Somera Universitato en Malmö. Tre interesa libro, ne tro teknika. 108 paĝoj, nun nur 2 ŝil., afranko 4p. Mendu ĉe B.E.A.

Balham Esperanto-Grupo kunvenas regule la unuan Ĵaŭdon de ĉiu monato ĉe 48, Ormeley Road, London, S.E.12 (apud Balham subtera fervojstacio kaj kontraŭ Balham Poŝtoŝtacio en Balham High Road). Ĉiu estas bonvena.

Liberpensuloj Esperantistaj en Britujo skribu al S-ro G. Dickinson, 21, Gribble Road, Liverpool, 10, pri fondo de Asocio de Liberpensuloj Esperantistaj.

The Workers' Esperanto Movement combats national prejudices and false patriotism. Write for free copy of "The Worker Esperantist" to 27, Argyle Road, Ilford, Essex.

The League of Catholic Esperantists. Details from Hon. Sec., Norman W. Vigar, 43, Defrene Road, London, S.E.26.

Socialist Leader, 48, Dundas Street, Glasgow, C.1. Single copies 3d.: 12 weeks 4s.: 24 weeks 8s.: 52 weeks 15s. 6d. Complete *Esperanto* article in every issue.

NOW IS THE TIME for you to give this to your Esperantist friends

THE British Esperanto Association consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership:—

SUBSCRIPTION: 20/- per annum. Persons joining after 1st July may pay 10s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I,

hereby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first

Subscription of

Signature

Nationality Rank, Profession or Occupation

Address

Date Age (if under 21)

ENGLISH-ESPERANTO CHEMICAL DICTIONARY

(Angla-Esperanta Kemia Vortaro)

de **D. R. Duncan, B.Sc., Ph.D.**

Eldonita por Brita Esperantista Scienca Asocio de B.E.A.

“La vortaro, kiu entenas inter 2 kaj 3 mil erojn, estas kompilita kun evidente ama zorgo, kaj oni povas tutkore kaj rekomendi ĝin kaj gratuli B.E.S.A. pri ĝia iniciativo.”

C. M. Bean.

Tole bindita ; 56 paĝoj ; Prezo 10ŝ., afr. 6p.

Mendu ĉe B.E.A.

NEW ADVANCED CORRESPONDENCE COURSE



This Course has been designed to serve as a sequel to the Association's Intermediate Course.

The aim of the Course is to help the student to reach a really high degree of proficiency in the knowledge and use of the language.

The Course of Fifteen Lessons costs only Fifty Shillings, including Textbook (*Step by Step in Esperanto*).

Send stamp immediately for Prospectus to the Secretary, B.E.A.